# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban,* **PERPIGNAN** *(P.-O.) - Telefono 34-38-84*

(Jara Abono : = I N.F.)

Numero 6 . APRILO 1962

SANA PRUDENTO VENKIS ........

Ĉe nia Asembleo en Lyon, la plimulto de la esperantistaro manifestis sian deziron ne plu disputi, kaj diskuti, sed LABORI !

Ni kore dankas la gelionanojn pro organizo, akcepto kaj afableco.

---

LA GESEMINARIANOJ EN "GRESILLON" , DUM PASKO.

La plej grava evento de la jaro estos la partopreno de 24 geseminarianoj dum nia Kultura Semajno en "GRESILLON" (I6 ĝis 23-4-62), je la kostoj de la Stato !

La gejunuloj devas esti helpataj, ĉar ili estas la "estonteco" ! La Kultura Semajno estos la starpunkto de gravaj realigoj en la lernejoj.

Se tiu semajno estus sekvata de la eksperimento en Romo; tio estus perfekte.

---

"ESPERANTO-KLUBOJ" EN LA LERNEJOJ.

Laŭ la ideo de André RIBOT, kvin "Esperanto-Kluboj" naskiĝis en Perpignan, ĉe 5 ŝtataj lernejoj. Aliaj urboj sekvis. Kompreneble, post la konsento de la estro de la lernejo, kaj nur post tio, oni povas krei "Esperanto-Klubojn", same kiel ekzistas "Kinaj Kluboj" k.t.p...

Oni vekas la intereson de la junaj lernantoj, starigante estraron, donante al il la specialan karton kiu donas al ili membrecon en nia nacia kaj internacia movado.

La klubo povas havi bibliotekon, organizi prelegojn kaj ankaŭ vojaĝojn eksterlanden.

Nacia Federacio kunligas la Klubojn kaj disdonas abonojn kaj premiojn.

Petu informojn ĉe la nacia sidejo: 5, Quai Vauban, PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

Vi ricevos la necesan dokumentaron kaj membrokartojn.

---

LA EKSPOZICIO LENTAIGNE-CAPUS, EN"GRESILLON"

La Prezidanto de U.E.F. prezentos, dum la Kultura Semajno (Pasko en Grésillon) la diapositivojn kaj aŭdigos la sonbendon de la bela ekspozicio Lentaigne-Capus el Montpellier.

---

FAMA POLA ESPERANTISTO EN"GRESILLON"

Invitota de S-no Pierre PETIT, nia Pola amiko RAJSKY, eminenta organizinto de la Universala Kongreso en Varsovio, partoprenos la Kulturan Semajnon (Pasko I962) kaj prelegos.

---

NIA MOVADO EN DEPARTEMENTO "GARD"

Oni scias la sindonemon de S-no JANNEZ, Redaktoro ĉe Akademia Inspektorejo en Nîmes. Ni ricevis de Ges. VOLPELIERE, I0, Rue de la Servie, Nîmes, leteron, pere de kiu ili deziras akcepti eksterlandan samideanon, okaze de rondvojaĝo. Oni ĉiam konigu al niaj amikoj la planon de la eksterlandaj prelegistoj. Tio helpos la organizon de propagandkunvenoj.

---

NOVAJ STATUTOJ POR " U. E. F. "

Por esti agnoskita pri publika utileco, novaj statutoj estis redaktitaj de la Faka Komisiono kaj aprobitaj de la Konsilantaro. S-no ROUGETET prezentos ilin dum la Nacia Kongreso en Baugé.(Pasko I962).

La Faka Komisiono devis sekvi, grandparte, la liniojn de la tipaj statutoj de la Ministerio.

## PROPAGANDA BULTENO EN FRANCA LINGVO

D-ro ALBAULT, ĵus elektita kiel Vic-Prezidanto de "U.E.F." (kaj ni profitas la okazon por gratuli lin) prezentos en Baugé (Nacia Kongreso) je la nomo de "Informa Fako", la projekton de propaganda bulteno en franca lingvo. Tio plezurigos certe nian amikon, D- ron MAILLARD kaj multajn samideanojn.

La Membroj de "Esperanto-Kluboj" ricevos senpage la bultenon.

---

## P.T.T. MAGAZINO N° 7 (Filmo en Esperanto)

Dank'al la afableco de S-no COLLOMB, Prezidanto de la Esperanta-Fako P.T.T., la Kultura Esperantista Centro en Perpignan prezentis, en la Seminario por Instruistoj, ĵaŭdon, la 22 an de Marto 1962, la filmon "P.T.T. Magazino N° 7", en esperanto.

Prezidis la kunvenon la Departementa Direktoro de P kaj T, S-ro GAILLARD. Apud li, estis S-no DUCANCHEZ, Intendanto de la Seminario kaj Profesoro de deviga kurso de Esperanto dum la unua jaro ĉe Seminario, kaj S-no LLECH-WALTER, Prezidanto de U.E.F.

---

## JEN REZULTATOJ ! HONORA TABELO ! (Reproduktenda)

Nia kara kaj sindona amiko Roger BLANC, en Sancoins (Cher) komunikis al ni la lastan statistikon (Marto 1962) pri la instruado de Esperanto en la Francaj Lernejoj :

EN 58 FRANCAJ LERNEJOJ FUNKCIAS 86 ESPERANTAJ KURSOJ KUN I.360 GELERNANTOJ !

---

## LA FOIRO DE BARCELONO UZAS ESPERANTON !

La XXX° Foiro Internacia pri specimenoj okazos de la Ia, ĝis la 20a de Junio 1962, en BARCELONO. La Foiro eldonis afiŝojn kaj afiŝetojn en Esperanto. Petu ilin, skribante esperantlingve al "Feria Oficial e Internacional de Muestras", Avenida Maria Cristina, Palacio N°I, Parque de Montjuich, BARCELONA. (Hispanujo)

---

## SUKCESO POR LA "ESPERANTO-KLUBO" DE MONTPELLIER.

Lastmomente, ni ekscias pri la rezulto de la konkurso inter la "ESPERANTO-KLUBOJ" de Francujo. Pasintjare, la "Esperanto-Klubo" de la Seminario en Perpignan gajnis la premion; ĉi-jare "Esperanto-Klubo" de la Liceo de Junulinoj en MONTPELLIER gajnis la belan verkon "RETORIKO" de nia eminenta profesoro D-ro LAPENNA.

Ni gratulas la membrojn kaj la responsan profesorinon S-inon LAURENTI. Jen la nomoj de la estrarinoj: Prezidantino: BLAYAC Mireille. Vic-Prezidantino: SADA Marie-Hélène, UZAN Nelly. Kasistino: MAURY Jacqueline. Helpkasistino: PEISSE Martine. Sekretariinoj : SOULIER Thérèse,ARRANZ Edwige, MARTINEZ Colette. Bibliotekistinoj: MILLOZ Brigitte, MIROUZE Brigitte.

Oni povas sendi gratulleterojn al "ESPERANTO-KLUBO", Profesorino LAURENTI, Lycée de Jeunes Filles, Avenue Georges Clémenceau, MONTPELLIER. (Hérault) Francujo.

---

## ATAKOJ KONTRAŬ ESPERANTO . NI KURAĜE RESPONDU !

La ilustrita franclingva revuo de Amerika Kultura Centro "INFORMATIONS ET DOCUMENTS" en sia numero I58 de la I5-a de Marto I962, eldonis artikolon pri la problemo de lingvo internacia, kaj titolita "LANGAGES ET COMPREHENSION" par Mario PEI. Post atenta legado, oni facile alvenus al la konkludo ke Esperanto estus fine kvazaŭ fiaska afero, tute ne taŭgante por la celo de Lingvo Internacia.

Tiu artikolo estas do fuŝa afero por Esperanto. Ni sekve ne devas toleri ĝin.

Al tiu "sensencaĵoj" jam respondis eminentaj samideanoj, interalie, la Nacia Prezidanto, S-no Argoutine, Marly kaj aliaj. - Se vi kapablas, ankaŭ fari tion, respondu (franclingve), ĝentile sed energie, ke Esperanto estas ne nur projekto, sed ĉiutaga realaĵo, en ĉiuj landoj de la mondo. Esperanto estas vivanta lingvo, havas sian literaturon, siajn ĉefverkojn. Estas pli ol 30.000 volumoj de Esperanto-Literaturo (ĉu originalaj,ĉu tradukaj), en la Nacia Biblioteko en Londono. Estas, tra la mondo, impona reto de Konsul-Delegitoj je la dispono de ĉiuj.

Multaj Akademianoj, eminentuloj kaj scienculoj interesiĝis pri Esperanto, ĉar ili estas certaj ke ĝi neniel povas esti bagatelaĵo aŭ neglektinda afero.

Bonvolu skribi al tiu adreso: "Informations et Documents", 4, Avenue Gabriel,PARIS VIII-ème. (Se eble, bonvolu sendi al ni kopion de via letero, sed sendu la originalon rekte al la suprecitita adreso.)

---

Abono al nia bulteno;I NF jare,per p.m. aŭ sendo al Federacia CCP 956-28 Montpellier

Dankon !